



6(134)
2012

Apudvistula Bulteno

de Krakova Societo ESPERANTO

Bultenon redaktas: ĉiuj anoj de Krakova Societo ESPERANTO,
Adreso por korespondi: str. Sokolska 13, 31-515 KRAKÓW

Tadeusz Miciński (1873 - 1918)

Lucifer

Jam ciemny jest wśród wichrów płomień boży,
lejący z jękiem w dal – jak głuchy dzwon północy –
ja w mrokach gór zapalam czerwien zorki
iskrą mych bólów, gwiazdą mej bezmocy.

Ja komet król – a duch się we mnie wicherzy
jak pył pustyni w zwiewną piramidę –
ja piorun burz – a od grobowca cichszy
mogił swych kryję trupiość i ohydę.

Ja – otchłań tęcz – a płakałbym nad sobą
jak zimny wiatr na zwiędłych stawu trzcinach –
jam błysk wulkanów – a w błotnych nizinach
idę, jak pogrzeb, z nudą i żalobą.

Na harfach morze gra – kłębi się rajów pożoga –
i słońce – mój wróg słońce! wchodzi wielbiąc Boga.

Bądź zdrowa! [jak dziwnie brzmi dzwon!]
Bądź zdrowa! [lecą liście z drzewa...]
Bądź zdrowa! [miłość jest jak zgon...]
Bądź zdrowa! [wiatr złowrogi śpiewa...]
– *Już nigdy!* –

Rwie serce Twój płacz!

– *Wydarł się z piersi niespodzianie,*
– *żegnam Cię: – trzeba – i Ty Boże racz –*
– *litości!... – –*

W konie!... Chryste Panie.

Lucifero

Mi, inter ventoj dia flam' de l' sombro
flugas foren – simila al nord-sonorilo –
bruligi aŭror-ruĝon en montara ombro
per stel' de l' feblo kaj dolora brilo.

Mi – astra reĝ' – kaj spirit' mia polvas
en efemeran sablo-piramidon
mi – tempest-tondr' – kaj per kvieto volvas
de miaj tomboj kadavrojn kaj hidon.

Mi – ark-abism' – kaj super si mi plorus
kvazaŭ en sekaj kanoj vento frida.
Mi – vulkan-bril' – kaj vojon mi favorus
sepult-funebran, tra valo humida.

Mar' harpludas – kirliĝas eden' incendia,
malamike leviĝas l' sun' – por laŭdo Dia.

Adiaŭ! [kiel stranga vort'!]
Adiaŭ! [falas foli-splendo ...]
Adiaŭ! [amo estas mort'...]
Adiaŭ! [morne kantas vento ...]
– *Jam neniam* –

La koron ŝiras plor',

– subita kri', dolora tristo!
– *mi lasas vin devige – iras for' –*
– *kompaton! ... – –*

Starto! ... Jesu' Kristo .

tradukis Lidia Ligeza

Krakova Societo ESPERANTO kun granda malĝojo sciigas,
ke forpasis
s.† m.

Jadwiga GIBCYŃSKA-JAROLIM

(26. 06. 1924 – 13. 07. 2012)

fama esperanta aktorino

La funebra diservo kaj entombigo okazis en Krakovo,
sur Batowice-Tombejo je la 12:20 h., 26. 07. 2012 j.

Gekolegoj kaj geamikoj



Ni adiaŭas personon vere elstaran en la esperanta medio. Ŝi dum multaj jaroj disvastigadis avantaĝojn de la internacia lingvo Esperanto en multaj lokoj de la mondo per sia valora arto. Dramartistino Jadwiga Gibczyńska post la diplomo en Krakova Teatra Altlernejo aktorinis en Vroclavo, Kalisz, Lodzo, Gdansko, Kielce kaj Krakovo prezentante pli ol 120 aktorajn rolojn. Ricevinte stipendion de Ministerio por Kulturo kaj Arto ŝi studis en Francio. Gvidado de la reĝisora ateliero en vroclava Aktora Studumo, la kunlaboro kun eminentaj krakovaj reĝisoroj kiel Swinarski kaj Jarocki kaj laboro en krakova Teatr Ludowy (La Popola Teatro) alportis 18 plenspektaklajn teatraĵojn, poeziajn recitalojn kaj porteatrajn scenariojn.

Jadwiga Gibczyńska aliĝis en 1969 al krakova Filio de Pola Esperanto-Asocio kaj de tiu tempo favore aktivis kiel kursgvidantino, estraranino kaj delegitino de UEA.

En 1964 en Gdansko ŝi fondis Unuaktorin Esperantan Teatron kaj unupersono fariĝis en ĝi reĝisorino, aŭtorino de scenarioj kaj kostumoj kaj antaŭ ĉio aktorino. Kun variaj dekkelkaj spektakloj de tiu teatro ŝi vizitis multajn Universalajn Kongresojn en Eŭropo, Azio, Ameriko kaj Aŭstralio (Hago – 1964, Tokio – 1965, Budapeŝto – 1966, Kopenhago – 1975, Lucerno – 1979, Vankuvero – 1984, Varsovio – 1987, Tampere – 1995, Prago – 1996, Adelajdo – 1997) altnivele promociante Esperanton. Jen kelkaj el ili: „La vojaĝo al verdaj ombroj” de Finn Methling, „La eta princo” de Antoine de Saint Exupéry, „Maria Curie” de Jadwiga Gibczyńska, „Slavaj fabeloj” de Bolesław Leśmian (esperantigis Lidia Ligęza), „Poezio de K. Kalocsay”, „Indianaj fabeloj”, „Zamenhof” de Jadwiga Gibczyńska, „En brilo de sceneja lum” de Kazimierz Szczurek, „Noemi” de P. Gibbins, „Signaloj” de Karol Wojtyła laŭ „Antaŭ vendejo de la juvelisto” (esperantigis Jan Kos kaj Tyburcjusz Tyblewski), „Falanto” de Sławomir Mrożek (esperantigis T. Tyblewski), "De tajgo al minaretoj" laŭ taglibro de Ada Fighiera-Sikorska. Certaj el ili estis plenumataj ankaŭ pollingve. En 1996 aperis la sonkasedo "Neniu povas ŝanĝi la hieraŭon", en kiu ŝi legas originalajn Esperanto-poemojn de Aira Kankkunen. Ŝi prezentiĝis ne nur dum la kongresoj, ekz. en Japanio, Kanado kaj Svedio, kie ŝi ankaŭ rektmetode instruis Esperanton. En la jaroj 1981 ĝis 1989 ŝi estis juĝantino pri teatraĵoj por la Belartaj Konkursoj de UEA.

Jadwiga Gibczyńska aktivis ĝis la malfrua aĝo. Februare 2001 en la krakova Urbocentra Kulturdomo okazis la unua spektaklo de Esperanta Scenejo ARENO, ludata de ŝi („Signaloj”). Sub ŝia artistita gvidado ARENO agis dum preskaŭ 10 jaroj prezentante esperantlingve kaj pole tekstojn i.a. de Leśmian, Tuwim, Mickiewicz, Słowacki, Reymont, Miłosz, Szymborska. En tiuj spektakloj krom la iniciantino elpaŝis helpe gekolegoj aktoroj kaj preskaŭ ĉiuj anoj de Krakova Societo Esperanto. ARENO volonte gastigadis esperantistojn landajn kaj eksterlandajn, kiuj prezentis la propran agadon; Igor Wasilewski – esperantan rapon, Jadwiga Dzięgielewska kaj Grażyna Nazarko – kanzonojn, Andrzej Kołpanowicz – ĝuste pentritan bildon, koruso „Najbarinoj” de Krzeszowice – ĝian repertuaron, Lidia Ligęza kaj Krystyna Hawlena – la aŭtorajn vesperojn, Kerstin Rohdin (Svedio) kaj Stanisław Mandrak – rakontojn pri landoj kaj urboj, krakova esperanta koruso „Kamea” – programon „Konstitucio de la tria de Majo”, d-ro Włodzimierz Opoka – lekcion pri la orienta masaĝo Yumeiho.

Pro longjara kaj valora laboro, ankaŭ esperanta Jadwiga Gibczyńska estis distingita per „Medalo al Stańczyk”, Honora Insigno – Meritoplana Aganto por Kulturo, Honora Insigno –

Meritoplena Esperantisto, titolo „Honora Membro de UEA” - 1997 (Gazetaraj Komunikoj de UEA n-ro 462) kaj kelkaj aliaj distingoj, premioj kaj gratulletoj. En 1996 Jadwiga Gibczyńska ricevis premion de Fondaĵo de Antoni Grabowski.

Bonsukcesa kaj diversflanka profesia agado de la artistino postrestis neforviŝeblajn spurojn en esperantistaj medioj de la tuta mondo. Kun granda fervoro, admirinda persisto, ĉiam altnivele, malgraŭ manko de helpo de aŭtoritatoj kaj diversaj obstakloj ŝi senriproze servis al la gravega ideo. Forpasis la esenca institucio de la esperanta kulturo. Grandbedaŭre ni honoras la memoron pri ŝi.

La arta agado de Jadwiga Gibczyńska havis profundan sencon. Ĝi elvokis multajn resonojn ĉe la spektantoj. La pruvo de ilia interesiĝo povas esti recenzetoj de Marian Kostecki kaj Johana el La Nigra Vilaĝo. Ne eblas citi ĉiujn, sed almenaŭ kelkaj povas montri neripeteblajn impresojn post la spektakloj kaj prezentiĝoj.

"Dum dua laŭvice spektaklo de ARENO elpaŝis Igor Wasilewski – ETERNE RIMA. Li prezentis al ni efektive modernan, junularan muzikon, bone aranĝitan, belsonantan, kompreneblan por ĉiuj aŭskultantoj. Lerte harmoniigita muziko kaj tekstoj, kiujn li mem verkis celtrafe, profunde impresigis ĉiujn. Seriozaj tekstoj posedas eĉ la filozofiajn premisojn, rilatantaj la homan sorton en la nuntempe disvolviĝanta civilizacio. ETERNE RIMA prezentis al ni sep elektitajn kanzonojn s.t.: „Ĉi tie regas ni“, „El profundego de l' infero“, „Vivi povre“, „Mortas la mondo“, „La vojo“ (teksto de d-ro L. L. Zamenhof), „Ni batalos“ kaj „Por miaj gefratoj“. La tuta aŭskultantaro fervore aplaudis senhezite ĉiujn prezentitajn programerojn pri situacio de la juna homo en la senanima mondo. Specialan, helpan etoson por la prezentiĝo scipovis fari la fondantino kaj artgvidantino de ARENO Jadwiga Gibczyńska trafe substrekante vortajn kaj muzikajn meritojn de la juna artisto." (*Marian Kostecki*)

"Maja spektaklo de la Esperanta Teatra Sceno ARENO (10.05.2004 j.) okazis tuj post grava por Pollando evento – ĝia reveno al la granda familio de Nacioj de Eŭropo. ARENO ankaŭ volis manifesti ĝojon pro ĉi-tiu fakto, do ne hazarde la artgvidantino, dramaktorino Jadwiga Gibczyńska elektis ĉi-foje tekston estantan kvazaŭ simbolo de la interhoma komuneco. Verkon de okcident-eŭropa literaturo, je kiu oni apogis spektaklon „La plej grava nevideblas por okuloj” amas infanoj kaj plenaĝuloj el multaj landoj. Ĝia aŭtoro, franco, Antoine de Saint-Exupery kreis „La Etan Princon” kvazaŭ kontraŭ soleco kaj malfidemo al aliuloj minacantaj al ĉiu homo. Ideo de universo konsistanta el multaj malgrandaj planedoj konvinkas nin, ĉar la mondo de ĉiu el inter ni ĝuste estas tia malgranda, apartigita planedo kun limigita ebleco interkomunikiĝi kun iu ajn. [...]En la spektaklo ludis dulingve – pole kaj esperante Jadwiga Gibczyńska, kiu ĝis nun prezentis ĝin multfoje lande kaj eksterlande nur esperantlingve. Eldiroj de Eta Princo tamen estis realigitaj esperante. La plenumo estis saĝa, sentema kaj majstreca. Precipe konvinke eksonis la averto de aŭtoro rilatanta al ni ĉiuj: „Vi ne ĉagrenu kaj rigardu en stelojn. La plej grava nevideblas por okuloj. Ni bone vidas nur per koro”. La rolantino samtempe adaptis la tekston kaj reĝisoris la tuton. Bazo por adaptaĵo estis „Le Petit Prince” de Antoine de Saint-Exupery elpoligita de Jan Szwykowski kaj esperantigita de Józef Toczyski." (*Johana el La Nigra Vilaĝo*)

"La 2-an de januaro de la 2006 j., je la 18-a horo la Esperanta Teatra Sceno ARENO ludis fragmentojn el la fama romano „Kampuloj” de la pola nobelpremiito de 1924 j. – Władysław Stanisław Reymont. Aŭtorino de la esperantlingvaj elmetaĵoj en tekston estis la artgvidantino de ARENO – dramaktorino Jadwiga Gibczyńska, kiu ankaŭ plenumis rolon de Jagustynka kaj reĝisoris la spektaklon. La tuton oni planis tre inventeme. Komence Celina Dudek faris antaŭparolon pri la vivo kaj verko de la aŭtoro. Pli poste ŝi, kiel sinjorino de la urbo gastigis en sia salono vilaĝan dungistinon. Inter du virinoj okazis tre interesa konversacio. La spitema, malcedema, ĉiam havanta propran opinion Jagustynka impulse rakontis al la „fremdulino” pri ĉiuj la plej gravaj eventoj en la vilaĝo Lipce. En nefacila, dialekta lingvo Jagustynka lerte raportis pri la aŭtunaj eventoj kaj laboroj, pri la lokaj amoroj kaj edziĝfestoj de Boryna, la plej elstara mastro en Lipce, pri internajbaraj kvereloj. Speciale multe da tempo Jagustynka dediĉis al la impone aranĝitaj ekleziaj solenaĵoj. Tre plaĉis al ŝi la ĉefa altaro en preĝejo ornamita per floroj faritaj el papero! Jagustynka neniam preterpasadis okazon, por scii ankoraŭ pli multe, do ŝi ne evitis post la Sankta Meso viziti la lokan drinkejon, kio kaj por ŝi kaj por la aŭskultantoj estis vere fascina. Elkoran dankon al la verkisto kaj ambaŭ plenumantinoj, ke ili rememorigis al ni aspekton de la pasinta pola vilaĝo, tiu, kiu restis nur sur la folioj de la romanoj." (*Johana el La Nigra Vilaĝo*)

Famaj preĝejoj de Krzeszowice kaj ĉirkaŭaĵo

La unua mencio pri la vilaĝo Krzeszowice datumas el la jaro 1286-a. Ĝis la fino de la XVI-a jarcento Krzeszowice apartenis al krakovaj episkopoj, kaj poste laŭvice al la magnataj familioj: Tęczyński, Opaliński, Sieniawski, Czartoryski kaj Potocki.

La plej gravaj konstruaĵoj de la urbeto ekestis ĉefe danke al la familio Potocki, kiu estis la lasta ĝia proprietulo. Al la plej imponaj lokoj en Krzeszowice apartenas la novgotika preĝejo, konstruita en 1832-a jaro, en la loko de la antaŭa ligna preĝejo, el 1326-a jaro. La nova preĝejo estis konstruita laŭ projekto de la fama berlina arkitekto Frederiko Schinkel. Dum lastaj jaroj la preĝejo estis bele renovigita. Sur ĝia impona sabloŝtona fasado staras statuoj de kvar evangelistoj, kaj super ili troviĝas blazonoj de ĝiaj fondintoj - de la familioj Potocki kaj Branicki. Ankaŭ interno de la preĝejo estas tre vizitinda.

Sur la monteto, ĉe la parko troviĝas Misiista Centro "Vincentinum", kun tre interesa eklektika kapelo al Sankta Stanislao, konstruita en 1875-a jaro. La Centro estis dum lastaj jaroj renovigita kaj plikonstruita kaj maje 2007 konseris ĝin kardinalo Franciszek Macharski.

Tre vizitinda loko - la frubaroka klostro de la senŝuaj karmelanoj - troviĝas en la vilaĝo Czerna, nur 3 km norde de Krzeszowice. La monakejo estis konstruita komence de la XVII-a jarcento sur deklivo de la monto super la pitoreska valo de Sankta Elio, laŭ kiu fluas la ĉarma torento Eliaszkówka. La monakejo, ĉirkaŭita per la ŝtona klostra muro 2,5 m alta, ampleksis 80 hektarojn de la monteta, forsta tereno, sur kiu estis konstruitaj 12 eremitejaj dometoj kun kapeloj, el kiuj plimulto jam ne ekzistas. De komenco, dum pli ol 150 jaroj la monakejo estis rigora eremitejo, al kiu alvenadis karmelanoj el ĉiuj polaj karmelanaj klostroj, por fari religiajn ekzercojn, kaj precipe dum la granda fasto kaj advento. En la monakeja teritorio troviĝis tri kavernoj, kiuj ankaŭ estis uzataj de eremitoj. Du el ili ĝis nun estas viziteblaj. La altaroj, plankoj kaj diversaj ornamaĵoj en la monakejo estis faritaj el la nigra marmoro, kiu estis ekspluatata en la ŝtonminejo Dębnik, situanta 2 km oriente de la klostro, kaj tiutempe apartenanta al la monakejo.

La nigra marmoro estis tiam tre populara kaj diversaj arkitekturaj ornamaĵoj en multaj preĝejoj kaj palacoj - ne nur en proksimaj vilaĝoj kaj Krakovo, sed eĉ ekz. en Vilno kaj Lvovo - estis faritaj el ĝi. En la monakejo de la XIX-a jarcento daŭras la kulto de la Skapulara Dipatrino, kies fama de gracoj bildo pendas en la flanka, norda altaro. En la klostra kapelo, dediĉita al sanktulo Rafał Kalinowski, troviĝas ĉerko kun restaĵoj de lia korpo kaj tie ankaŭ daŭras lia kulto. Krome, la monakejo posedas multajn interesajn objektojn ekz. la klostran muzeon, kiu amasigis, krom la eksponaĵoj pri historio de la ordeno, ankaŭ la riĉan kolekton de diversaj objektoj, venigitaj de misiistoj el afrikaj landoj.

Ĉirkaŭ 2 km nordoriente de la monakejo, en la vilaĝo Paczółtowice staras la bone konservita, malfrugotika ligna preĝejo kun la tegmento tegita per ŝindoj t.e. malgrandaj lignaj tabuletoj. La preĝejo, konstruita en 1520-a jaro, klasifikita estas al la nula klaso de antikvaĵoj. Interne, en la ĉefa altaro troviĝas la fama gotika bildo de Dipatrino, la triptiko el 1460-a jaro, la bronza baptujo el la XVI-a jarcento kaj aliaj valoraj bildoj kaj ornamaĵoj. En Paczółtowice de naŭdekaj jaroj de la pasinta jarcento funkcias la fame konataj terenoj por golfoludo kun bona bazo por manĝado kaj loĝado.

En la najbara vilaĝo Raclawice, 2 km nordoriente de tie, troviĝas ankaŭ la antikva ligna preĝejo konstruita en 1511-a jaro. Ankaŭ ĝi havas la ŝindan tegmenton. Interne de la preĝejo, sur la vandoj troviĝas bela polikromio el la XVII-a jarcento. La baroka ĉefaltaro posedas la grandvaloran bildon de Dipatrino kun Infaneto. Altvaloraj estas ankaŭ la gotika statuo de Dipatrino el la XV-a jarcento, la krucifikso staranta sur ĉielarka trabo, la baptujo farita el la nigra marmoro en la XVII-a jarcento kaj la marmora tomboŝtono de iu kavaliro el la XVII-a jarcento.

Ankaŭ en aliaj apudaj vilaĝoj staras vizitindaj preĝejoj kaj multaj ĉarmaj kapeletoj, ekz. en la vilaĝoj Tenczynek, Sanka, Zalas, Nowa Góra.

Krome, en nia regiono troviĝas ankaŭ multaj aliaj tre interesaj lokoj. Mi tre ĝojus, se miaj rimarkoj instigus vin viziti tiun interesan regionon.

Zbigniew Duda